

Theodor Storm,  
En la arbaro

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉi tie ĉe l' deklivo  
Mutîgas nun la vent',  
Kaj sidas sub la branĉoj  
Infano en silent'.

En timian-odoro  
Ŝi sidas sur la ter';  
La bluaj muŝoj zumas  
Kaj brilas tra l' aer'.

Silentas la arbaro,  
Rigardas saĝe ŝi,  
Kaj ĉirkaŭ la harbukloj  
Fluadas sun-radi'.

Kukolo ridas fore;  
Pensigas io min:  
Ŝi havas la okulojn  
De la arbar-reĝin'.

*Traduko de la Germana poemo "Im Walde" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-172-344 (2004-02-22 11:32:56)*

Theodor Storm,  
Im Walde

Hier an der Bergeshalde  
Verstummet ganz der Wind;  
Die Zweige hängen nieder,  
Darunter sitzt das Kind.

Sie sitzt in Thymiane.  
Sie sitzt in lauter Duft;  
Die blauen Fliegen summen  
Und blitzen durch die Luft.

Es steht der Wald so schweigend,  
Sie schaut so klug darein;  
Um ihre braunen Locken  
Hinfließt der Sonnenschein.

Der Kuckuck lacht von ferne,  
Es geht mir durch den Sinn:  
Sie hat die blauen Augen  
Der Waldeskönigin.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04).*

*Arg-172-343 (2004-02-22 11:29:45)*